

Naskiĝo de la svisa federacio, rolo de generalo Bonaparte
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.02.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La unua tutsvisa konstitucio estis trudita de la franca registaro en aprilo 1798. Ĝia centrismo ne povis konveni al lando kun kvar lingvoj, abundo da dialektoj, du religioj kaj dudeko da politikaj centroj.

A.- Por esprimi sian abomenon al tiu trudita respubliko, nomata **Helveta Respubliko unueca kaj nedividebla**, la svisoj nomis ĝin ŝerce **Helveta Respubliko unueca kaj nevidebla**.

Cl.- Kun unuanimeco ili faris ĉion eblan, por ke tiu respubliko estu fakte nevidebla. La kantoj, kiuj konstitucie posedis **landkunvenon** (en la germana **Landsgemeinde**), dum siaj landkunvenoj rifuzis akcepti tiun truditan konstitucion. La arbaraj ŝtatoj Uri, Schwytz kaj Unterwalden (en la germana Waldstätten) decidis organizi komunan armeon kaj eĉ elektis armeestron.

A.- Oni povas kompreni, ke la franca armeo tuj intervenis. Sed tiuj intervenoj ne helpis tiun konstitucion fariĝi pli videbla.

Cl.- Svislando estis nura satelito de Francio. Pro tio ĝi fariĝis ideala okazejo por bataloj inter la franca armeo kaj tiuj de la kontraŭa koalicio.

A.- Ekzemple kiam oni veturas tra la pasejo San-Gotardo, oni rimarkas en la gorgo Schöllenen memorigilon, kiu atestas la trapason de rusa armeo gvidata de generalo Suvarof.

Cl.- Du kontraŭaj tendencoj montriĝis en la svisa politika vivo. Unu estis centrismema, la alia federismema. Ambaŭ deziris novan konstitucion. Sed neniu akceptis fari kompromison inter la kontraŭaj vidpunktoj. Regis reciproka netoleremo.

A.- La franca generalo **BONAPARTE** baldaŭ konstatis la fiaskon de la trudita reĝimo. Tial li proponis novan pli federigan konstitucion. Tiu projekto kapablis nur akriĝi la disputojn.

Cl.- Tiam nova konstitucio estis proponita de la franca registaro mem kaj submetita al plebiscito. Ĝi estis nete rifuzita per 92 mil voĉoj ne kontraŭ 72 mil jes kaj 162 mil sindetenoj.

A.- Tial la organizintoj de la plebiscito, kiuj volis, ke la konstitucio estu lege valida, adiciis la jesojn al la sindetenoj kaj proklamis la novan konstitucion akceptita per grandega plimulto.

Cl.- Generalo BONAPARTE antaŭvidis civilan militon. Estis bona kaŭzo por interveni en la svisan politikan vivon. Li do ordonis al la franca armeo forlasi la svisan disputejon.

A.- La kantono Schwytz tuj kunvokis Dieton kun tagordo anoncanta la redaktadon de nova konstitucio. Anstataŭ akordiĝi pri kompromisa projekto la ambasadoroj de la kantoj blinde defendis la kantonajn patriotismojn. La berna ambasadoro havis teritoriajn pretendojn super la ekskolonioj ĵus liberigitaj. Oni povas kompreni, ke tiuj ĉi landoj ne volis akcepti tiun renaskiĝon de la berna imperiismo.

Cl.- Kelkaj kantoj kreis komunan armeon kaj elektis generalon.

A.- Dum jarcentoj, pro neekzisto de centra superkantona registaro, plej diversaj disput-kaŭzoj amasiĝis sensolve. Nun fine ĉiu provas trudi sian vidpunkton, eĉ per rimedoj perfortaj, se montriĝas okazo favora al la propra kaŭzo. Por naciistoj, kiuj diigas la propran ŝtaton, ĉiuj rimedoj estas pravigeblaj, eĉ kunlaboro kun la okupantoj. Inter la kantonoj naskiĝas konfliktoj, militoj eĉ.

Cl.- Generalo BONAPARTE revenas kun forta armeo por trudi sian mediacion. Svisa delegitaro devas iri al Parizo por akordiĝi pri nova konstitucio. Sed tiuj delegitoj neniel akordiĝas. Tiam generalo Bonaparte mem verkas federacian konstitucion, kiun la svisoj devas akcepti.

A.- Sur karikaturaj oni vidas sinjorinon Helvetio, kiu provas resti en rajda ekvilibro sur kalcitrema azeno, kiun francaj soldatoj provas obeigi, dum la svisaj spektantoj ridaĉas.

Cl.- Bonaparte ne povis vekti senton pri sviseco ĉe popoloj, kiuj kulturadis kantonan patriotismon dum jarcentoj.

A.- Tamen la konstitucio proponita de generalo Bonaparte estis sufiĉe taŭga por lando kiel Svislando. La malnovaj kantonoj estis restarigitaj kaj ricevis la rajton mem decidi pri sia kantona konstitucio. Ĉiuj malnovaj kantonoj tuj revenis al siaj malnovaj kutimoj. Kontraŭe la novaj kantonoj sin donis demokratajn konstituciojn.

Cl.- Kunvivado inter tiuj du specoj de kantonoj ne estis ebla. Kiam Napoleono falos en Waterloo, tiam sinjorino Helvetio ne plu povos obeigi sian kalcitreman azenon. Ŝi falos, tuj kiam la francaj soldatoj ĉesos gvidi la azenon. Kaj la svisoj ĥore ridaĉos.

A.- En Vieno la ambasadoroj de la eŭropaj ŝtatoj grupiĝos en Kunveno. Ĉu la svisoj fine kapablos silentigi siajn kantonajn disputojn por sendi komunan federacian delegitaron? Ne! Tion ili ne kapablos, ĉar fakte federacio ne ekzistas. Pro tio kvin delegacioj iros en Vienon por reprezenti la interesojn de la svisoj, aŭ pli bone, la disputojn de la svisoj.

Cl.- METTERNICH, la ministro por eksteraj aferoj de Aŭstrio kaj la caro Aleksandro la unua devos vigle interveni por silentigi la disputojn de tiuj strangaj svisoj.

A.- Karikaturu bone priskribas la svisan atmosferon en tiu epoko postnapoleona. Oni vidas la kantonajn ambasadorojn en Dieto, kiu kunsidadis en la urbo Zŭrich dum 17 monatoj. Kelkaj el ili verŝas akvon en kriblilon, aliaj rigardas al akvon forflui, kaj la ceteraj ridaĉas kaj sin reciproke minacas pro religiaj diferencoj. Ĉiuj provas sin diferencigi de la ceteraj.

Cl.- Rezulto: Ne estis la svisoj mem, kiuj desegnis siajn kantonajn limojn, sed la ambasadoroj de la grandaj potencoj. Kaj tion ili kompreneble faris ne profite al Svislando, sed al la najbaraj potencoj. Kiam la svisoj ekkonstatos tion, tiam la Viena Kongreso estos jam de longe ferminta sian pordon.

A.- La historiaj faktoj, kiujn ni priskribas hodiaŭ, montras, ke juraj ŝanĝoj truditaj de okupantoj, ne havas longan vivon, kaj ne malhelpas la daŭrigon de tradiciaj politikaj disputoj. Se la disputantoj silentas momenton por forpeli la okupanton, je lia foriro la disputoj tuj renaskiĝas. Tion ni vidas en multaj landoj luktantaj por sia sendependeco.

Cl.- La svisoj mem devos venki siajn dividojn per originalaj rimedoj. Tio estos la temo de la venonta prelego.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andree GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la Svisa Federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribi. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*